

# esperanto sub — LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

januaro - februaro 2007 • numero 85 | volumo 15 - numero 1



En Melburno 7-jara Kulab manĝas vegetaĵojn flosantaj sur la akvo



En novembro elefantoj el Tajlando atingis Aŭstralion por loĝi en zooj en Melburno kaj Sidnejo. Supre kaj maldekstre, du en Melburno.

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIJO

N<sup>o</sup> 85 • Vol 15.1 • Jan-feb.2007

**Redaktoro:** Donald Broadribb

## ELDONADO

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, uzante la programon Mellel, kaj la tiparojn Futura, Onyx kaj New Century Schoolbook.

## ABONOJ & PASINTAJ NUMEROJ

Abono kostas Aŭ\$40. Pagu al Libro-servo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.

[libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au)

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la suda kruco* kostas \$A3.00 + poŝtsendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

*Esperanto sub La Suda Kruco* estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

## *Esperanto Sub La Suda Kruco*

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎(08)96411937 • 📠(08)96411134

[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldono respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

© 2007, AEA & NZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruco* preparis Igor de Oliveira Couto.

## En Ĉi Tiu Numero

### Prepare por la Somerlernejo/ Jarkunveno 2007:

Pliaj klarigoj pri la statuto de AEA (Marcel Leereveld) .....	3
Komuniko de la Sekretario de AEA ..... Esperanto Federation of Victoria (Henry Broadbent) .....	4
Kio okazas inter Aŭstralio Esperanto-Asocio kaj Esperanto- Federacio de Viktorio (Franciska Toubale) .....	7
La prezidanto de AEA komentas.....	8
Somerkursaro en Hobarto (Marcel Leereveld) .....	8
Perpoŝta voĉdonado (Miranda Lutz) .....	10
Provizora Tagordo de la AEA jar- kunveno .....	10

### Artikoloj normalaj:

La ĝemoj de Ĝemeloj (Mikaela Tritiko/Margaret Chaldecott).....	11
Interrete .....	16
<i>Mummy, why can't we speak the same language?</i> .....	16
Konu viajn kungesamideanojn — Indrani Beharry-Lall .....	17
La Biblioteko de AEA (Hugh Malcolm) .....	19
Aŭstralio-Brazilia projekto (Stephen Pitney) .....	20
Obituary: Peter Lloyd .....	21
Ĉu la libroservo ankoraŭ estas servo? (Nicole Else) .....	22
Prelego pri Esperanto en Universi- tato de Sidnejo (Nicole Else) .....	23
Recenzas Odlo Bokserp .....	26
Elĉiela vizitanto (Debra McCarney) .....	30

**Bonvolu atenti ke komence kun la marto-aprila numero, la limdato por kontribuoj al *ESK* estas la 5a de la antaŭa monato. Ekz., la limdato por la marta numero estas la 5a de februaro.**

# Prepare por la Somerlernejo/Jarkunveno 2007

## Pliaj klarigoj pri la statuto de A.E.A.

de Marcel Leereveld

**Demando:** Kiam, laŭ la Statuto, oni elektas la novajn Estraranojn?

**respondo** (§15+17): Oni elektas ilin *nur dum la jarkunveno*.

**Demando:** Kiuj, laŭ la Statuto, elektas la Estraranojn?

**respondo** (§19): *La ĉeestantoj* kaj la mandatoj [proxies] elektas la Estraranojn, dum la Jarkunveno.

**Demando:** Kiel oni elektas dum la Jarkunveno?

**respondo** (§19): Oni elektas la Estraranojn *per voĉdonado*, dum la Jarkunveno.

**Demando:** Ĉu tiu voĉdonado okazas *nur* dum la Jarkunveno?

**respondo:** Jes, ĉar voĉdonado estas parto de la elektado.

**Demando:** Ĉu kandidatiĝo estas parto de la elektado (= voĉdonado)?

**respondo:** Ne, ĝi estas *preparo* por la elektado.

**Demando:** Ĉu kandidatiĝo eblas antaŭ la Jarkunveno?

**respondo** (§ 20): Jes, laŭ la Statuto oni *rajtas, do ne devas*, kandidatiĝi antaŭ la Jarkunveno, nome skribe ĝis du monatojn antaŭ la Jarkunveno.

**Demando:** Ĉu kandidatiĝo devas dum la Jarkunveno ankaŭ okazi skribe?

**respondo** (§ 20): Ne, ĉar la Statuto diras, ke ĝi devas okazi skribe *nur se iu(j) kandidatiĝas antaŭe*.

**Demando:** Ĉu ĉiu kandidatiĝo okazas perpoŝte?

**respondo** (§ 20): Nur tiu, kiu okazas skribe du monatojn antaŭe.

**Demando:** Ĉu kandidatoj kaj kandidatigantoj antaŭ 9 Novembro devas esti membroj por la sekvonta jaro?

**respondo** (leĝe): Ne, ili devas esti membroj dum la kuranta jaro, ĉar la alteco de la kotizoj determinatas nur post la elektoj.

**Demando:** Ĉu kandidatoj dum la Jarkunveno devas esti membroj por la sekvanta jaro?

**respondo:** Ne, ankaŭ ili devas esti membroj de la kuranta jaro, ĉar dum la elektado oni ankoraŭ ne povas esti membro de la sekvanta jaro, ĉar nur poste oni decidas pri la kotizoj por la venonta jaro.

**Demando:** Ĉu elektado inkluzive de voĉdonado, kiu ja okazas nur dum la Jarkunveno, okazas skribe sekrete?

**respondo** (leĝe): Nur se la membroj deziras tion kaj se estas pli ol unu kandidato por iu ofico.

**Demando:** Ĉu oni laŭleĝe rajtas malobei la regulojn Statutajn?

**respondo** (leĝe): *Ne, escepte se iu neregula procedo estis kutimo dum antaŭaj jaroj.*

**Demando:** Kiom da mandatoj [proxies] unu persono rajtas uzi por voĉdonadoj?

**respondo:** Laŭleĝe ne pli ol po kvin por ĉiu ĉeestanto.

**Demando:** Ĉu, laŭ la Statuto, oni por la voĉdonado ankaŭ pri statutŝanĝoj kaj financaj aferoj rajtas uzi mandatojn?

**respondo** (§19+31): *Ne*, ĉar kontraŭe al la decidoj pri aliaj aferoj, la Statuto klare diras, ke nur *ĉeestantoj* voĉdonas pri statutŝanĝoj kaj financaj aferoj. □

## Komuniko de la Sekretario de AEA

Mi ricevis la sekvajn formularojn por nomumado por la AEA estraro 2007:

Prezidanto / President  
*Igor de Olivera Couto*  
*Marcel Leereveld*

Vicprezidanto 1/Vice President 1  
*Penelope Vos*

Vicprezidanto 2/Vice President 2  
*John Abood*

Sekretario / Secretary  
*Ivan Heldzingen*  
*Miranda Lutz*

Vicsekretario / Vice Secretary  
*Gordon Coleman*

Kasisto / Treasurer  
*Stephen Pitney*

Vickasisto / Vice Treasurer  
*Jennifer Bishop*  
*Heather Heldzingen*

## Esperanto Federation of Victoria

by Henry Broadbent, Hon. Secretary of E.F.V.

The article "Krizo por Esperanto en Aŭstralio" was published in the Sep.-Oct. issue of *ESK* in the hope that the contentious matters would be explained in the Nov.-Dec. Issue. This has not happened and I am now reluctantly writing to all AEA members concerned to inform you of the basic facts which are causing so much consternation in Australian Esperanto circles, particularly by internet.

AEA: ASSOCIATION OR COMPANY?

The AEA is a "not for profit Association" registered in the ACT under the Associations Incorporation Act 1991. The public officer must reside in the ACT. The new committee in Tathra announced that the previous committee wanted to transfer from A.C.T. to Victoria, which would require some changes in the statutes. The members voted

for some money to be allocated for legal advice about those changes. However, Heather Heldzingen, being suitably qualified, investigated the matter, without cost, and advised the committee early this year what steps must be taken to make the transfer. The changes need to be put to a vote at the AGM and, if passed, ratified by post to gain sufficient members as legally required.

Meantime our new President decided that it would be better to change from an association to a “not for profit” company with a board and members to be shareholders with a limited liability. The President gained support from some committee members and money allocated for legal advice has been spent on non-legal advice to determine how to make such a change. There is contention as to whether this initiative should be approved. According to *ESK* we will be given information about the proposed change soon.

These matters will need to be discussed by the members at the AGM.

#### ELECTION OF THE NEXT AEA COMMITTEE.

Clause 20(a) of the rules gives the right (that is, it is not mandatory) of 3 members to nominate a member for a committee position in writing to the Secretary 2 months before the next meeting. The clause provides for members who cannot attend a meeting to nominate members for the committee.

The committee has no right to make the nomination date of Nov.

9th mandatory, nor do they have the right to allow postal votes. See Nov.-Dec. 2006 *ESK* page 5. These cannot be accepted at the meeting because other nominations may be made during the meeting as has been established by right of precedent and normal practice and in accordance with part 1.4, section 22 (2) (c) of the Association Incorporation Regulation 1991.

This is a matter for discussion by members at the AGM

#### LIBROSERVO

This year we have not had a Libroservo since April, initially due to building work and then the Committee did not reemploy Nicole Else, who had been performing this task so expertly. The Committee claimed that the cost was too high and also that Nicole did not work efficiently or use modern techniques. Was this a case of lack of training with unfamiliar tools? A prime reason was certainly a clash of personalities.

For many years the Libroservo has supplied a subscription list with prices with the final *ESK* of the year. Some features of the Libroservo have been restored with the help of volunteers but the subscription list has not been provided and we will have to make our own arrangements this year to renew subscriptions to UEA and Esperanto journals. Instead we have been supplied with a form to sign to assure the committee of the AEA (unknown at this date) of our allegiance.

We were also advised that our membership would now run 18

months to the end of June 2008 instead of for 12 months to the end of Dec. 2007. This is a decision for the members to make at the AGM and can only be recommended by the committee.

The NSW Federation, which has been bearing much of the costs of the Libroservo, claim that it is too expensive. Do we still need a libroservo? How is it to be managed? Who is going to pay for it? These are questions which should be on the Agenda at the AGM.

#### VICTORIAN STATE REPRESENTATION ON THE COMMITTEE

At the January 2006 AGM the new President invited the States to put forward a representative to the Committee as allowed for in the Statute 20(B) "After the Congress the Committee will accept one further member from each State Federation (if that exists)".

The Esperanto Federation of Victoria voted Bernie Heinze to be their representative at their February AGM. Bernie was duly accepted onto the AEA Committee until it was discovered that the EFV had not paid their affiliation fee to the AEA. (This was an oversight.) Instead of a friendly request to the Secretary of the EFV to pay their fee, Bernie was advised directly and not through the Federation, who were not approached, that he was no longer on the Committee.

On 22 September, while reading through the newly constituted Internet Forum, I learnt for the first time that Andrew Lutz, a member of the newly formed Torquay Es-

peranto Coffee Club, had been appointed by the AEA Committee as the representative of the "Federation of Victoria". This is, of course, unacceptable to the members of the EFV.

The EFV has now paid its affiliation fee (not because we think that it is necessary but because we wish to do so) and has requested that Bernie be reinstated as its Victorian committee member. This request has not yet been granted. Instead we have been presented with a document for signature by the President of the EFV (Franciska Toubale) stating that the EFV agree with the aims of the AEA, our Association, to which most members of the EFV belong as individual members. Perhaps our AEA President, whose mother tongue is not English, is confused by the unfortunate choice of "Affiliate" as the translation of "Aliĝinto" instead of the more correct word "Associate". The agreement to co-operate together is one between equals and not a father to son relationship which the Secretary is trying to force on us.

The Secretary of the AEA has advised that the matter is now in abeyance until it can be handled by the next committee. This means that it will have to be discussed by the members at the AGM before the old committee steps down

#### SUMMER SCHOOL COSTS

Vice-President Marcel Leereveld, with the help of Treasurer Steve Pitney, has been working hard all year organizing the Summer School in Hobart. Our AEA

President, as “teksestro”<sup>1</sup>, was asked to update the Web Page, [www.aesk.esperanto.org.au](http://www.aesk.esperanto.org.au) according to the summer school brochure. This has been done but some conditions and rates have been changed without reference to Marcel. This is going to cause confusion to those at-

<sup>1</sup> *Teksestro* = “webmaster”. < Tut-Tera Teksaĵo = World Wide Web. — [d]

tending the Summer School and it will greatly reduce its income.

This matter will also need to be discussed and settled, preferably at the start of the Summer School.

Finally, most items of contention could be quickly settled if the younger members of the committee were willing to listen to advice from the older and more experienced members. □

## Kio okazas inter Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Federacio de Viktorio de Franciska Toubale

Merkredon la 25an de januaro kadre de la AEA kongreso en Tathra la sekretario, Miranda Lutz, skribis la tagordon sur tabulon:

*Punkto 3: Federaciaj reprezentantoj* — La prezidanto, Igor Couto, dum la kunveno, petis la federaciojn elekti reprezentanton.

La 11an de februaro 2006 kadre de la Jarkunveno, la membroj de la Esperanto-Federacio de Viktorio elektis Bernie Heinze kiel reprezentanton de la Federacio en AEA.

Komence de Aŭgusto Bernie Heinze ricevis mesaĝon de la sekretario de AEA ke la estraro de AEA voĉdonis favore al lia eksigo el la estraro de AEA, ĉar la Federacio de Viktorio ne estas filio de AEA.

Estis neniuj kontaktoj tiuteme kun la estraro de la Federacio de Viktorio

Fine de Aŭgusto la fondinto de la radio-programo en Esperanto de 3ZZZ, Svetislav Kanacki, rifuzis

anonci ke la estraro de AEA voĉdonis favore al la estraranigo de Andrew Lutz, membro de la Torquay Kafo-Klubo, kiel reprezentanton de la Federacio de Viktorio

La 22an de Septembro la vicsekretario de AEA, Ivan Heldzingen, sendis leteron al la sekretario de la Federacio petante ke la Federacio kunsideru fariĝi filio de AEA.

La 1an de Oktobro la sekretario de la Federacio, Henry Broadbent, nome de la Federacio, sendis leteron al la vicsekretario de AEA, esprimante la deziron fariĝi filio de AEA, kune kun ĉeko kaj la petitaj dokumentoj.

La 14an de Oktobro okaze de la ekskurso de la Federacio, la sekretario de AEA, Miranda Lutz, konfirmis voĉe al Bernie Heinze ke li ne plu estas reprezentanto de la Federacio en AEA sed ke Andrew Lutz estas.

Hodiaŭ estas la 17a de Oktobro,

neniu respondo de AEA estis sendita al la estraro de la Esperanto-Federacio de Viktorio.

Jen la faktoj.

Ĉiu konas la statuton kaj regulojn, kiuj regas AEA kaj povas mem juĝi pri la situacio.

Mi donis tiun ekzemplon ĉar la

voĉdono por la nova estraro alproksimiĝas. La sekretario de AEA eĉ memorigis la membrojn per *ENK* julio/augusto ke eblas jam sendi la nomumon de kandidatoj. Estas la momento serioze pensi pri kian prezidanton de AEA kaj kian asocion ni volas. □

*La prezidanto de AEA, Igor Couto, komentas:*

La Estraro ricevis peton de kelkaj membroj de la EFV, ke ni ne decidu pri la membreco de EFV antaŭ ol ĝia sekvanta Ĝenerala Jarkunveno en februaro.

La EFV en la komenco de la jaro, responde al formularo sendita al ili, informis al AEA, ke ili *ne* estis membroj niaj, sed ke ili ja havis reprezentanton en nia Estraro (Bernie Heinze). Tion ni fakte ne konsciis, sed ricevinte tiun respondon, Steve Pitney fakte rimarkis, ke EFV ne estis membro de AEA dum (almenaŭ) la lastaj 5 jaroj.

Mi tuj sendis leteron al la tuta Estraro, dirante, ke mi opinias, ke tio temis nur pri miskompreno kaj misatento de EFV, kaj ke devus esti evidente, ke organizo kiu *ne* estas membro nia, ne rajtas havi membron en nia Estraro, kaj influi niajn internajn aferojn. Mi eĉ proponis, ke se la problemo temis pri mono (la pago de la membrototizo), AEA povus akcepti la EFV eĉ senpage. Mi specife petis al Bernie, Ivan, Heather kaj Marcel (kiuj estas “*eminentuloj*” en EFV), ke ili pritraktu la aferon kiel eble plej rapide.

## Somerkursaro 7 - 19 Januaro 2007

### en Hobarto, Belega Tasmanio

de Marcel Leereveld

Pliaj komunikoj por Esperantistoj kaj Esperantontoj.

Post mia unua listo de partoprenontoj unu juna esperantistino plendis:

1) ke ŝia nomo mankis sur la listo;

2) ke mi publikigis la liston.

Ni organizas la Somerkursaron kiomeble profesie. Ni ne registras partoprenontojn simple ĉar ili diris “Hej, Marcel, mi prenos parton.



Metu min sur la liston”. Aŭ ĉar ili diris al iu ke tiu iu diru al mi, ke ili aliĝas, sen pruvo.

Mi registras partoprenontojn nur:

1) se ili sendis perpoŝte al mi aŭ interrete al Steve Pitney (laŭ la Libro-Servo) sian plenigitan Aliĝilon, kaj

2) se ili krome pagis la registriĝ-kotizon.

Ambaŭ plenumatu! Kelkaj personoj faris nur unu el la du; mi metas ilin en atendskatolon, kaj donas al ili numeron (por facile retrovi ekstran korespondadon), sed mi ankoraŭ ne registras ilin. La instruistoj kaj la infanoj, kiuj ĉiuj estas niaj gastoj, kompreneble registriĝas sen pagi kotizon. Post tio Steve sendas al la pagintoj kvitancon. Ne utilas, (sed nek malutilas), peti al Steve sendi fakturon, ĉar ĉiu povas vidi mem sur la Aliĝilo, kiom ili devas pagi.

La juna esperantistino, kiu plendis ĉar mi publikigis la liston, estas la nura persono kiu iam plendis pri tio, kaj mi ellasos ŝian nomon el la listo, por komplezi. Mi kompreneble daŭrigos publikigi la liston, ĉar la plendo baziĝas sur la aŭstralia “privacy act” kaj ĉar:

1) Ĝis nun neniu plendo okazis dum la lastaj 50 jaroj;

2) Mi ellasos la nomon se oni petas min;

3) Ankaŭ UEA publikigas la nomliston de la kongresanoj;

4) Mi publikigas ankaŭ la nomojn de ekzamenitoj, k.t.p. en *ESK*.

5) Pluraj estas AEA-membroj, kies nomoj ja aperas en la Jarlibro;

6) Laŭleĝe la sekretario de or-

ganizo devas doni, se petita, la nomojn de ĉiuj membroj de la organizo al membro kiu petas tion;

7) Mi disdonas la nomojn nur interne de grupo de samideanoj.

Se tamen iu pensas same kiel la juna esperantistino, nome ke aliaj esperantistoj ne rajtas scii ke ŝi/li prenos parton en la Somerkursaro, bonestu informi min, kaj mi ellasos ankaŭ vian nomon. Ĝis hodiaŭ aliĝis la jenaj personoj (memoru vian numeron!):

- 1) Barrie Cledsmith, Vic.
- 2) Margaret Chaldecott, NSW
- 3) Elrae Adams, Vic.
- 4) John Adams, Vic.
- 6) Henry Broadbent, Vic.
- 7) Betty Broadbent, Vic.
- 8) June Perkins, Qld
- 9) Marcel Leereveld, Vic
- 10) Toshinobu Araj, Japanujo
- 11) Eileen Jones, SA
- 12) Kay Andersen, Qld
- 13) Caroline Turner, Qld
- 16) Mary Mills, NSW
- 17) Bernard Heinze, Vic
- 18) Franciska Toubale, Vic
- 19) Atilio Orellana de Rojas, Nederlando,
- 22) Trevor Steele, SA
- 23) Paul Gorny, NSW
- 24) Vernon Wildy, NSW
- 25) Katarina Steele, SA
- 26) Paul Green, Qld
- 27) Hazel Green, Qld
- 28) Patricia Palmer, SA
- 29) Jennifer Pender, Tas
- 30) Carol Linnane, SA
- 31) Brendan Linnane, SA
- 32) Jenny Bishop, Vic
- 33) Alan Bishop, Vic
- 34) Bradley McDonald, Novzelando
- 35) Gareth Cranefield, Novzelando

Nur 27 el ili loĝos en la Univerŝitato.

La Somerkursaro povos fariĝi tre sukcesa, malgraŭ la malalta nombro da partoprenontoj ĉar, krom ke okazos la normalaj kursoj kaj intereseĝaj aranĝoj, la hobartanoj (Robert, Brend, k.a.) intencas organizi vizitojn al tipe tasmaniaj aranĝoj hazarde okazantaj dum niaj du semajnoj. Ili ankaŭ penas venigi sespersonan Esperantan muzik-grupon afrikan. Krome eble venos sep japanaj esperantistoj, kelkaj veteranaj.

Do ne maltrafu rejuniĝi en la plej bela provinco de Aŭstralio (tio estas mia persona gusto, tamen), kaj (re)renkonti plurajn esperantis-tojn junajn kaj maljunajn, kaj regalati de AEA-Jarkunveno en kiu montriĝos la taŭgeco de Esperanto ankaŭ en rapideĝaj pireteknikaj diskutadoj en flua Esperanto. Tio donos bonan ekzemplon al la dek infanoj verŝajne prenontaj parton.

Estu la atmosfero dum tiuj du semajnoj same ĝuinda kiom en ĉiuj niaj antaŭaj Somerkursaroj. □

---

## Perpoŝta voĉdonado de Miranda Lutz sekretario de AEA

Post ricevado de pozitivaj reagoj al la propono de perpoŝta voĉdonado por la venonta Estraro de AEA, kaj ricevinte la leĝajn rekomendojn, mi komprenas ke statuta ŝanĝo devas okazi antaŭ ol ni kapablos uzi la esprimon “perpoŝta voĉdonado” en niaj proceduroj.

Tial, la AEA ne faros “perpoŝtan” voĉdonadon por la elekto de sia venonta Estraro. Tamen, formularoj

por reprezentado [proxy forms] estos uzebaj kaj atingebaj baldaŭ, kaj membroj povos rekte indiki siajn elektojn. Mi kredas, ke tio estas pli egala kaj demokrata ideo, kaj permesos ĉiujn membrojn rekte doni siajn opiniojn.

Mi pardonpetas pro iuj maloportuneco kaj maltrankvileco, kiujn la uzo de la esprimo “perpoŝta voĉdonado” kaŭzis. □

---

## Provizora tagordo de la AEA jarkunveno

9a, 10a, 11a januaro 2007

venu je 19:00 por malfermo je 19:30

Christ College Conference Hall  
The University of Tasmania  
Sandy Bay, Tasmania, 7005

La tagordo inkluzivos la sekvajn:

- protokolo de la jarkunveno 2006

- propono: ŝanĝu la buĝetan proponon “\$5,000 maksimume por leĝa konsilo”, aldonu “kaj aliaj afe-

roj” ĉe la fino;

- propono: “ke AEA ŝanĝu sian registriĝon al kompanio limigita per garantio”

- raportoj, estraro kaj aliaj
- elekto de estraro
- aliaj proponoj
- komisionoj

## La Ĝemoj de Ĝemeloj

de Mikaela Tritiko

[Margaret Chaldecott]

(skeĉo premiita en la Literatura Konkurso de UEA 1980)

*La kurtenoj malfermiĝas. Meze de la scenejo staras tri personoj: la reĝisoro kaj du aktoroj. Ili interparolas, legas paperojn. La reĝisoro subite vidas ke la scenejo estas videbla. Li iras antaŭen kaj vokas...*

**Reĝisoro:** Ho, ve, vi ĉe la kurten-tirilo —fermu la kurtenojn. Ni ne estas pretaj!

*La kurtenoj fermiĝas. Post kelkaj sekundoj la reĝisoro elvenas.*

**Reĝisoro:** Bonvenon, geamikoj, kaj mi petas vian pardonon. Vi ĉiuj venis ĉi tien por aŭdi kaj vidi la plej freŝdatan skeĉon de la fama verkistino Mikaela Tritiko. Mi bedaŭras ke pro diversaj kaŭzoj, ni ne estas pretaj. La skribaĵo alvenis nur hieraŭ, kaj kvankam ni unue diskutis inter ni kiu ludos kiun rolon, kaj la aktoroj jam legis siajn rolojn private, ili ĝis nun ne prezentis la skeĉon. Ŝajnas ke la unuaj ekzempleroj de la skribaĵo perdiĝis survoje, kaj la verkistino devis rapide retajpi la paĝojn. Vi, kara aŭdantaro, estas tre pacienca, kaj mi kore dankas vin, kaj

nun mi havas la honoron prezenti al vi ... (legas la paperon) **La Ĝemoj de Ĝemeloj.** La du aktoroj estas Kastoro kaj Polekso (li denove rigardas la paperon) Polukso<sup>1</sup>. La tempo estas la nuntempa. La urbo estas la ĉitiea.

*(Li reiras malantaŭ la kurtenojn, kiuj denove malfermiĝas. Meze de la scenejo estas la rolantoj. Ne gravas ĉu ili estas similaj laŭ aĝo aŭ alteco. Ili firme tenas la paperojn kaj legas...)*

**Kastoro:** Bonan tagon, mia sin-amiko. Ĉu vi ankoraŭ amas vin? Belaj estis la tagoj kiam ni estis junaj knaboj, kaj la patrino tiel mirinde zorgis pri ni. Krom la maloftaj atakoj de astro, ni ambaŭ estis tre sanaj, kaj do feliĉaj.

**Polukso:** (Interrompas, ne legas.) Astro?

**Kastoro:** Kio? (Rigardas la skribaĵon.) Necesas korekto, mi pensas. Devas esti “atakoj de astmo”. (En la maniero de aktoro:) Kompatinda panjo, ŝi unufoje diris ke dum nia unua atako kiam ni fajfspiris kaj

<sup>1</sup>. Pri nekutimaj vortoj, vidu post la fino.

tusis, ŝi suferis pro historio ... (*paŭzas*) ... Mi relegu tion ... kaj tusis, ŝi suferis pro historio. Sed ŝi vartis bone pri ni kaj ni fartis bone.

**Polukso:** Mi memoras ke ŝi estis tre lerta kuiristino ... kudristino. Niaj varmaj veŝtoj kaj la lanugaj manumoj kaj kolumoj estis la plej belaj vidataj sur la strato. Kaj kia estis la ĵaluzo de la aliuloj en la lernejo kiam ni portis niajn novajn biretojn?

**Reĝisoro** (*subite, ĉar ĝis nun li ŝajne legis aliajn paĝojn:*) Polukso, mi petas, relegu tiujn vortojn.

**Polukso:** Kiamaniere? Pli laŭte, aŭ pli rapide?

**Reĝisoro:** Ne, legu ilin per via menso; pensu pri la signifo de ĵaluzio. Kiaj estas la fenestroj de via domo? Ĉu ili havas ŝutrojn kontraŭ la suno kiujn oni nomas ĵaluzioj? Kaj pensu pri la aliaj vortoj kiujn vi legas. Vi devas legi la skribaĵon zorge, ĉar vi scias ke la verkistino devis tajpi la paĝojn rapide kaj eble aperas eraroj. Do mi ripetas, legu lerte. Ek!

**Polukso:** (*al la reĝisoro:*) Mi pardonpetas. (*Li legas la paperon, kaj uzas kraĵonon*) Jes, vi pravas, estas eraroj. Mi legis nur per la okuloj, ne per la menso. (*Al Kastoro:*) Niaj varmaj vestoj kun la lanajaj manumoj kaj kolumoj estis la plej belaj vidataj en la strato. Kaj kia estis la ĵaluzo de la aliuloj en la lernejo kiam ni portis niajn novajn ... (*al la reĝisoro:*) Mi ne rajtas diri "biretojn", mi pens-

as — ili estas kardinalaj kapvestoj, sed beretoj estas malgrandaj beroj, ĉu ne?

**Reĝisoro:** Certe, beretoj estas malgrandaj beroj; sed bereto estas tia ĉapo kian mi portas ... (*li demetas sian bereton kaj montras ĝin*)

**Polukso:** Kiam ni portis niajn novajn beretojn! Jes, mia frato, tiuj estis tre feliĉaj tagoj.

**Kastoro:** Vi estis spertulo ĉe la gimnazio — ĉu vi ankoraŭ estas atleto?

**Polukso:** Vi devas diri "gimnastejo". Ĉe la gimnazio vi estis spertulo pri kurso kaj ĉe la gimnastejo, mi estis spertulo pri kurado. Jes, mi ŝatas sportojn!

**Polukso:** Multaj estis la disputoj — ne, diskutoj — pri niaj venontaj karieroj, kaj kiel la gepatroj plendis pri la doloroj elspezataj dum niaj jaroj da edukado!

**Polukso:** Doloroj? Ne dolaroj?

**Kastoro:** Eble, sed mi vetas ke vi, en viaj adultaj jaroj, trovis ke unu iras kun la alia.

**Polukso:** Frato mia, vi insultas min! Mi postulas vian apologon! Kion vi scias pri mia vivo kiu devigas vin nomi min adulta? Certe mi multe vojaĝis tra la mondoj, kun multaj aventuroj, sed tute sen aventurinoj.

**Kastoro:** Se vi estus ministro, estas dubinde ĉu vi trovis aventurinojn — sed ĉu ne estis aventuristinoj kiuj gaje elspezus vian monon?

**Polukso:** Sur la maro? En miaj tramondaj vojaĝoj mi trovis nur amindan virinon. Estis pri si ke mi sendis al vi la literon — ne, leteron — pri mia antaŭnelonga edziĝo.

**Kastoro:** Ne estas ofte ke oni ricevas en la posto tian sokon. Vi, la ĉiama fraŭlo.

**Reĝisoro:** Mi ripetas kaj repetas vin — legu viajn paĝojn kaj pensu. Eble plenkreskulo adultas, sed ne ĉiuj plenkreskuloj estas adultaj. La pli mallonga vorto estas “adoltoj” kaj sendube estis tajperaro. Pens-eraro estas la vorto “insulti”. Vi volas diri “malhonoras” aŭ “ofendas”. Oni ne donas “apologon” post ofendo, sed “apologion”. Kaj, jes, Kastoro, aventurino ne estas virino diamantamanta ...

**Ĝemeloj (kunkune):** Kia aĉa ŝvarc-aĵo!

**Reĝisoro:** Finfine, ŝajnas ke la tajpistino perdis du supersignojn — relegu “poŝto” kaj “ŝokon”.

**Kastoro:** Ne estas ofte ke oni ricevas en la poŝto tian ŝokon. Vi, la ĉiama fraŭlo. Mi ĝojis ricevi vian leteron en la posto — poŝto — pri via lastatempa edziĝo, Kiu estas via edzino, ĉu mi konas ŝin?

**Polukso:** Mi dubas. Ŝi estas svelta blondulino, kun bukla fringo kaj la plej belaj okuloj. (*Al la reĝisoro:* Ĉu fringo estas ĝusta? Antaŭ kelkaj tagoj mi aĉetis paron da birdoj kaj oni nomis ilin “fringoj”. Kio estas en via manuskripto?)

**Reĝisoro:** Franĝo.

**Polukso:** Mi dankas vin. (*Denove al Kastoro:*) Kun bukla franĝo kaj la plej belaj okuloj. La franĝo preskaŭ kovras la brovojn super tiuj mirindaj okuloj. Ŝi kuras tre lerte.

**Kastoro:** Ĉu? Ĉu ŝi kuras post vi aŭ antaŭ vi? Kiu ĉasis, kiu kaptis?

**Polukso:** Ho ve, alia eraro. Ŝi kuiras tre lerte. Ŝia patrino diris ke la vojo al vira koro estas laŭ la ventro, do dum jaroj ŝi studis pri la kuirado. Mi ja trovis trezoron. Ŝi laboras ĉe la benko ...

**Reĝisoro:** Banko!

**Polukso:** ... banko apud la kanelo.

**Reĝisoro:** Kanalo, kanajlo vi!

**Polukso:** ... banko apud la kanalo kie, akirinte mian boaton, mi devis atendi ĝis la doganisto atentis miajn paperojn. Ŝi vidis la velon kaj estis scivolema pri ĝi. Ŝajnas ke ŝi ĉiam volis iri sur boacon ...

**Kastoro:** Kial? Ĉu ŝi estis filino de Paĉjo Kristnasko?

**Polukso:** Ne, certe ne — kia idiotismo estas tiu demando?

**Kastoro (pedagoge):** Ĝi ne estas nelogika vortkonstruo; eĉ ne estas idiotajo. Vi diris, ke via amatino volis iri sur boacon; boaco estas la norda cervo kiu tiras la sledon de Paĉjo Kristnasko. Eble vi volas diri ke bonŝance, via amatino ankaŭ ŝatas la vivon en kaj apud kaj koncerne boatojn. Vi estas feliĉa homo, trovinte tian trezoron. Ĉu ŝi havas grandan interezon en la boato?

**Polukso:** Ne, ŝi ne estas financa fianĉino, tamen ŝia patro tre mal-

avare dozis ŝin.

**Kastoro:** Kio?

**Polukso:** ... dotis ŝin kiam ni metis la avison en la ĵurnalo pri la venonta edziĝo.

**Kastoro:** Avison? Ne avizon?

**Polukso:** Avizon, jes. Li donis al ŝi grandan ĉenon — ne, ĉekon. Sed jes, ŝi havis grandan intereson en la boato.

**Kastoro:** Kiam vi edziĝis? Mi bedaŭras ke mi ne ĉeestis ĉar, kiel via plej frua kunludanto, mi tre volus esti staranta kun vi ĉe la altaro dum la nupto. Sed mi devis labori eksterlande kaj tute ne povis reveni. Ĉu via amatino estis bela edzino? Mi komencis novan serion de fotoĵoj pri la kutimoj en diversaj landoj, inkluzive pri la edzfestoj. Ekzemple, multaj virinoj, ĉefe la patrino de la nova edzino, ploras; mi ne scias kial. Ĉu ili ploras pro ĝojo, aŭ ĉar ili antaŭvidas la problemojn antaŭ la naivulino?

**Polukso:** Mia bopatrino ploris dum la ceremonio; multaj lardoj — ho ve, larmoj — fluetis laŭ ŝiaj vangoj, kaj ŝi forviŝis ilin per la pinto de la ŝelo kiu kovris ŝiajn ŝultrojn.

**Kastoro:** Via bopatrino ŝajne havis molan koron kaj malmolan haŭton; sed eble sur via skribaĵo la vorto devus esti “ŝalo”.

**Polukso:** Vi pravas.

Nu, ĉiu fraŭlino ravas en la tago de sia edziniĝo. Mia Brigita estis eĉ pli bela ĉar ŝi ĉiam estis bela. Sur

ŝia belega blonda hararo estis la plej ĉarma ... (*paŭzas kaj relegas*) punta vualo? (*Al la reĝisoro:* laŭ angla boatlibro, “punt” estas prameto.)

**Reĝisoro:** Jes, sed laŭ esperanta vortaro “punto” estas maldensa teksaĵo. Punta vualo ne estas tajperaro, kvankam la vortoj aspektas eraraj.

**Polukso:** Mi dankas vin. Ĉe la dorno de ŝia robo estas elefanta — ne, eleganta — rubando ... (*paŭzas kaj relegas*) ... ĉe la dorso estas rubando. Ŝi portas bukedon de falsaj rosoj kaj papaĵoj ...

**Kastoro:** Kia nekutima bukedo!

**Polukso:** Pardonu min. Ŝi portis bukedon de falvaj rozoj kaj papaĵoj. ...

**Kastoro:** Kiajn florojn si portis? Falsajn aŭ flavajn?

**Polukso:** La floroj ne estis artefaritaj, kaj ilia koloro estis tre hele flava — ŝi priskribis ilin kiel “falvaj”, do mi uzis la vorton. Mia Brigito estis la plej bela edzino. Estas, ja.

**Kastoro:** Estas bedaŭro ke mi ne povis uzi miajn solajn, unikajn fraton kaj bofratinon en la serio!

**Polukso:** Se vi vere volas fotografi nin, venu al nia nova domo kaj ni povos denove vesti en la edzfestaj vestaĵoj. Brigita estas bele dresita en blanka kotono ...

**Kastoro:** Ho, ve, vi ankoraŭ ne konas multon pri virinaj aferoj. Kotono ne taŭgas kiel ŝtofo de edzinrobo. Kaj pri la robo mem — ĉe-

valoj estas dresitaj. Ĉu vi jam pensas ke via ĉarma Brigito estas ĉevalinaĉo? Tiel frue? Kara frato, mi simpatias ...

**Polukso** (*al la reĝisoro:*) Mi tute ne volas daŭrigi ĉi tiun turmentadon. En preskaŭ ĉiu linio estas tajperaro. Kaj kiam mi volas improvizi, li kritikas min. Sed li mem fuŝas sian improvizon, ĉar se li pensus, li dirus "kunsentas". Li devus kritiki la trikantan Tritikon.

**Polukso** (*daŭre parolas:*) Ĝis vi trovos taŭgan teatraĵon, mi diras ... Ĝis! (*dissirinte la paperojn, li*

*foriras.*)

**Reĝisoro** (*surprizita, vokas ...*) Vi ĉe la kurtenantirilo, fermu la kurtenojn! *Li reaperas antaŭ la kurenoj kaj diras:*

Se la eraroj vin ofendis  
kaj la aktoroj multe plendis  
vigligis viaj pensoj.

En la vortludo mi prezentis  
ĉu la insidojn vi atentis  
ja vivas viaj sencoj!

Ho ve,  
denove.

Sencoj!

### \**Nekutimaj vortoj, listo kompilita de la redaktoro:*

**Apologo/apologio.** *Apologo* = alegorio, anekdoto. *Apologio* = formala defendo de oniaj agoj.

**Aventurino/aventuristino.** *Aventurino* = mineralo, speco de kvarco. *Aventuristino* = virino kiu havas aventurojn.

**Aviso/avizo.** *Aviso* = nearmita militŝipo portanta komunikaĵojn. *Avizo* = formala informo, deklaro.

**Dozo/doto.** *Dozo* = mezurita kvanto da medikamento. *Doto* = mono donita al novedz(in)o, pagita de la familio de la novnuptul(in)o.

**Fringo/franĝo.** *Fringo* = speco de birdo. *Franĝo* = hararanĝo sur la frunto.

**Interezolintereso.** *Interezo* = mono donita al pruntedoninto, kiel


kompenso pro la prunto. *Intereso* = scivolemo pri afero.

**Kanelo/kanalo.** *Kanelo* = sulko; *kanalo* = artefarita rivereto.

**Kotono/katuno.** *Kotono* = lanugo de planto, el kiu oni fabrikas la ŝtofon *katuno*.

**Polekso/Polukso.** *Polekso* = dikfingro. *Polukso* = (en la greka mitologio) = unu el la infanoj de Zeŭso.

**Soko/ŝoko.** *Soko* = parto de plugilo. *Ŝoko* = bato neatendita, ĉu de la animo, ĉu de la korpo.

**Ŝvarcaĵo:** Raymond Schwartz (1894-1973) = tre populara humoristo, kabaretisto, kaj verkisto esperantista. Li famiĝis pro sia lerta vortludado. 



## • Interrete


e-libroj elŝuteblaj ĉe [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org)

Henrik Ibsen: **Dramoj**

*Hedda Gabler*

*Puphejmo*

*La Sinjorino el la Maro*



*The second edition of this book, published in August 2006, can be bought for \$6.95 + \$1.97 postage to anywhere in Australia, from the author:*

Nicole Else  
1/359 Pacific Highway  
Asquith NSW 2077

*Topics include:*

1. Languages of the world
2. Similarities between languages
3. How languages differ: by their grammar
4. How languages differ: by their alphabet

5. Chinese writing
6. Japanese writing
7. Writing numbers in different languages
8. Different ways of writing English: Braille, Morse, shorthand
9. Phonetic and simplified English spelling
10. Languages in Australia
11. Why is translating so hard?



12. The need for a common language
13. Why can't everyone learn English?

14. What is Esperanto?
15. Why is Esperanto easier to learn?



## • Konu viajn kungesamideanojn

### Biografio de Indrani Beharry-Lall



Indrani, la dua infano de hinddevenaj gepatroj, naskiĝis la 12an de novembro 1941 en San Nicolas, sur insulo Arubo, tiama nederlanda kolonio en Maro Kariba

kiu akiris sian sendependecon en 1986.

Ŝia patro, la 5a el 11-infana familio, venis al la insulo el la najbara Gvajano por serĉi laboron. Unu jaron poste li reiris al Gvajano, edziĝis kaj ekde tiam konstante loĝis sur Arubo. La unua infano de la familio estis knabo.



La familia lingvo estis la angla, sed la insula komunikilo estis la papia-menta. Kaj kiun lingvon oni uzis en la lernejoj? La nederlandan.

Ĉar la gepatroj volis doni al sia filino eblecon de bona edukigo kaj ĉar Indrani parolis nederlande, kiam ankoraŭ ne 16-jara ŝi forvojaĝis al Roterdamo, kie studis ankaŭ ŝia frato. Aliaj kulturo, kutimoj kaj vete-

ro, sed Indrani bone adaptiĝis kaj tre bone studis, ŝi eĉ estis la plej sukcesa en sia klaso de estontaj optikistoj. Sed bone ekkoninte la metion de optikisto ŝi malkovris, ke ĉitekника laboro ne kontentigas ŝin kaj ke ŝi ŝatus esti optometriisto, kiu havas taskojn pli medicinecajn. La plej proksima loko, kie tiutempe eblis studi la elektitan fakon, estis Britujo, do post 3-jara nederlandumado en 1960 ŝi transloĝiĝis al Londono. La universitatajn studojn ŝi finis en 1964 kaj aldonajn 3½ jarojn ŝi poste laboris tie jam en sia fako de optometriisto.

Tiutempe ŝi spertis ion novan: rasismon. En la komenco de la 1960aj jaroj venis en Britujon multaj enmigrintoj kaj la blankhaŭtaj civitanoj rigardis la alikolorajn homojn kun malamo. En Nederlando oni alrigardis ŝin kun intereso kiel kuriozaĵon, sed ne diskriminaciis. “Mi ne volas esti duaranga civitano” — decidis Indrani. Dum tuta ŝia familio migris al Kanado, Indrani iris al Gvajano. Ŝi trovis tie laboron kaj restis 3 jarojn. Vizitante la familianojn en Toronto dum la malvarma kanada vintro ŝi ne emis ekloĝi tie. Tamen, poste, en 1970, ŝi

trovis laboron en Vankuvero, kie la vetero estas pli plaĉa ol en Toronto, iĝis — kaj daŭre restas — kanada civitano kaj restis enlande por ŝi nekutime longan tempon: 18 jarojn.

Estante ŝajne denaska vagabondo iun tagon Indrani decidis labori portempe alilande. Tial ŝi venis en 1988 kun 2-jara laborvizo al Adelajdo, sed ĉar ŝi tre kontentis pri siaj laborkondiĉoj, ŝi restis en Aŭstralio.

Entute 35 jarojn ŝi estis laborinta en sia “metio” kiam ŝi en 2000 emeritiĝis.

Ŝi certe ne enuas de tiam! Anstataŭ la infanaĝan baleton ŝi praktikas “klog”-dancadon, ŝi biciklas, aktivas en la rondo de amantoj de la klasika muziko, en la rondo de legantoj de beletro, ŝi volontulas en “Meals-on-wheels”, same volontule helpas enmigrintojn alproprigi la anglan kaj senpage laboras ankaŭ por “Oxfam”. Kaj ĉu vi sciis, ke ŝi bele aranĝadas florojn en la japana stilo *ikebana*?



Sed la plej granda amo de Indrani estas vojaĝado. Ne nur ke ŝi loĝis en 6 diversaj landoj, kiel turisto ŝi vizitis amason da aliaj. Ni menciui ili nur kelkajn interesajn lokojn: Alaskon, Borneon, Galapagojn, Tirolon, Tajlandon, Javon, Vjetnamon, Egiptujon, Jordanon, Turkujon, Ĉinujon, multajn afrikajn landojn, Bolivion, Mongolujon, Nepalon....



Kaj ni ankoraŭ nenion diris pri ŝia esperantista vivo! Ĉar ankaŭ ĝi estas plena de eventoj kaj interesaj spertoj, Indrani konatigos nin pri ĝi en alia fojo.

[El *Tamen Plu*] □

# La Biblioteko de AEA

## de Hugh Malcolm

Dum la lastaj jaroj, la biblioteko de AEA restis kun la biblioteko de AIIA (Aŭstralia Instituto de Internaciaj Aferoj) en Kanbero. Post mia emeritiĝo kiel bibliotekisto kaj la AEA jarkunveno, mi provis iomete pliordigi la libraron. Sekve de kolega konsilo, mi komencis enskribi bibliografiajn detalojn de la libraro en [LibraryThing.com](http://LibraryThing.com) por ke ĉiu membro de AEA povu serĉi tie. Progresis malrapide ĉar necesas aŭ tajpi detalojn origine aŭ kopii detalojn linion post linio el la plej granda aro de esperantaj libroj en la Nacia Biblioteko de Aŭstrio. (<http://aleph16.onb.ac.at>)

Bedaŭrinde, la estro de AIIA decidis renovigi la ĉambrojn tie kaj deziras ke la Esperanto-biblioteko estu forigita. Nun la libraro kuŝas neatingebla en skatoloj en tenĉambro. Mi kalkulas ke ĝi bezonas ĉ 72 metrojn da bretoj por surbretigi la tutan aron. Estas ankaŭ aktoŝranko kiu enhavas sonbendojn, sonkasedojn kaj fotografalbumojn, k.t.p. AIIA estas simpatia kaj eble donacos bretojn. Estas ses bretoj en unu “spano” (angle “bay”) do postulas ĉambron kiu povas akomodi maksimume 12 metrojn da bretoj. Ankaŭ bezona estas almenaŭ unu persono kiu scipovas la “Dewey Decimal system” minimume por surbretigi la librojn kaj labori kun mi por krei seneraran katalogon en

[LibraryThing.com](http://LibraryThing.com).

Mi rekomendas [LibraryThing.com](http://LibraryThing.com) al ĉiuj kiuj gardas aŭ zorgas pri libraro aŭ persona aŭ institucia. La ilo estas ege simpla, kaj oni povas tre rapide krei katalogon de libraro ĉar ĝi estas rete ligita al multaj, grandaj, ekzistantaj bibliotekoj. [LibraryThing.com](http://LibraryThing.com) tre rapide serĉas diversajn katalogojn kiujn la serĉanto direktas. Trovinte la serĉitan libron oni povas, per unu klako, kopii la bibliografiajn detalojn en vian personan aŭ institucion katalogon. Ekzemple, kiam mi unue provis la ilon, mi trovis katalogajn detalojn por la *Korano* en Esperanto (el la Nacia Biblioteko de la Usona Kongreso), por *The Concise Course in Esperanto* de L. N. Newell eldonita en 1929 (el la Nacia Biblioteko de Skotlando) ktp. Se vi ne trovas la serĉatajn detalojn, vi devas tajpi la bazajn detalojn en la formularo sur la ekrano. Tio bezonas ĉ. unu minuton!

Por legi la detalojn de la ĉ. 130 libroj kiujn mi jam enskribis en [LibraryThing.com](http://LibraryThing.com), aliĝu ĉe la retpaĝo kaj serĉu la bibliotekon de “membro” AEA. Mi komencis je la komenco en Dewey-sistemo do tiuj libroj estas plejparte pri religiaj aŭ filozofiaj temoj.

Enketoj pri la biblioteko aŭ pri [LibraryThing.com](http://LibraryThing.com) sendu al:

[Hughm@gmail.com](mailto:Hughm@gmail.com). □

## Aŭstralia - Brazilia Projekto de Stephen Pitney

Rotario Internacia estas monde konata organizo kiu konsistas el lokaj kluboj de profesiaj homoj kiuj klopodas helpi siajn lokajn kaj la internacian komunon. Rotaria Amikaro De Esperantistoj (RADE) estas unu el la centoj da fak-amikaroj de Rotario Internacia, kompareblaj al la fak-rondoj de UEA. Nuntempe estas RADE-anoj en 24 landoj, en ĉiuj kontinentoj. Celo de RADE estas plenumi unu el la ĉefaj celoj de Rotario kiu estas la interkompreniĝo kaj mondamikeco. Por pli da detaloj vidu: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Rotaria\\_Amikaro\\_de\\_Esperantistoj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Rotaria_Amikaro_de_Esperantistoj).



Rotarianoj en la kuracejo

En 2004 mia rotaria klubo de Richmond en Viktorio partoprenis en projekto kun la Rotaria Klubo de Brazilia Leste por starigi dentan klinikon por malriĉaj orfaj infanoj en Brazilia. La projekto estas finita kaj jen fotoj de la malferma ceremonio. Ĉiu komunikado inter niaj kluboj estas en Esperanto kaj RADE-ano en Brazilia legis salutmesaĝon de Richmond kaj tradukis ĝin al la portugala.



La kuracejo de la kliniko



Dediĉo de la kliniko



Rotarianoj ĉe la inaŭguro



---

## Obituary: Peter Lloyd

1961-2006

by Agnes Bray

Described by a fellow colleague as “a brilliant mind” and his death headlined in the newspaper as “brilliant environmentalist” it is not surprising that Dr. Peter Lloyd should also have been an Esperantist and member of both NZEA and UEA.

Although his sudden death was a tragedy it is also in keeping that

he collapsed and died while cycling to go on duty at the Hawkes Bay Hospital in Hastings. He was putting into practice what he preached and tried to persuade people to do: live environmentally friendly lives. He had sold his own fuel-inefficient 4wd and biked to work.

He was born in Wales in 1961 and came to New Zealand with his

parents to finish his secondary schooling in Auckland. He graduated in medicine at Otago and then spent two years as a GP back in Wales before deciding to specialise in anaesthetics. He was a staff anaesthetist at the Hawkes Bay Hospital since 1993.

Peter Lloyd was known to “love medicine” and was particularly knowledgeable about the history of anaesthesia. He was a man of immensely wide interests. It was almost natural that he should be attracted to the ideals of Esperanto and taught himself the language. (he also knew Welsh, Maori, Spanish and Portuguese). Because of his busy life, both professional and family, he did not have the oppor-

tunity to be active in the Esperanto movement but was a supportive member of both NZEA and UEA. In recent years he was a sought-after speaker on environmental issues and only a week or so before his death was lead speaker at a forum in Hawkes Bay on care of the environment as integral to social justice. He lived his convictions that the world must live more sustainably. His own home was electricity efficient, he had a great vegetable garden and he rode a bike. He had three young children who not only lost their father but, also their grandfather. Peter’s father died only an hour before Peter’s funeral. □

---

## Ĉu la libroservo ankoraŭ estas servo?

de Nicole Else

La libroservo nun “funkcias” per volontuloj. En julio ne-esperantista kompanio kiu mendas librojn por publikaj bibliotekoj mendis unu ekzempleron de mia libro *Mummy, why can't we all speak the same language*. Ĉar la libroservo tiam ankoraŭ ne refunkciis pro la renovigoj en Esperanto-domo, mi respondis ke estos iom da prokrasto.

Iom da tempo poste mi ricevis leteron dirantan ke AEA ne plu pretas dungi min por labori en la libroservo kaj petis min doni ĉiujn mendojn, leterojn, ktp al AEA sekretariino Miranda. Mi tion faris

kaj do donis al ŝi ankaŭ la mendon por la biblioteko.

Komence de septembro mi ricevis demandon de ne-esperantista surreta lingva vendejo. Ili skribis, demandis kiom da rabato ili povas ricevi se ili aĉetas 20 ekzemplerojn. Mia libro estas eldonita de AEA kaj ĉar mi ne plu laboras por la libroservo mi pensis, ke mi ne mem rajtas decidi kiom da rabato doni. Mi do sendis la demandon al la komisiito de la libroservo: Anthony, kaj sendis ankaŭ kopion al la normala libroserva retadreso.

La 2an de novembro mi eksciis,

ke la libroservo ankoraŭ havas 7 ekzemplerojn de mia libro kaj tio signifas, ke la libroservo ankoraŭ ne sendis la libron al la biblioteko kiu mendis ĝin en julio. Mi ankaŭ demandis ĉu eblus ricevi kopion de la respondo al la demando pri vendoprezio por 20 libroj. Anstataŭ ricevi respondon al miaj demandoj mi ricevis leteron klarigantan, ke la libroservo ne plu pretas vendi mian libron. Diras Anthony ke cetere la libro estis eldonita de AEA kaj ne de la libroservo, do ne estas la laboro de la libroservo vendi la libron. Mi naive pensis, ke la libroservo estas ja la libroservo de AEA kaj do vendi librojn eldonitajn de AEA estas unu el ĝiaj taskoj. Mi skribis al Miranda, ke ŝi bonvolu sendi al mi kopion de la

mendo de la biblioteko, se la libroservo ne intencas sendi la libron al ili, sed ĝis nun ĝi ne alvenis. Intertempe la kompanio mem sendis al mi kopion de la julia mendo kaj mi do mem sendis la libron.

Mi ja estas tre seniluziigita pri la fakto ke la libroservaj volontuloj ne serioze pritraktas mendojn kaj demandojn pri mia libro. Kial Anthony ne respondis al la demando pri kosto de 20 libroj? Kial se li opiniis, ke ne estas lia tasko respondi al tia demando, li ne plusendis la demandon al alia persono anstataŭ ignori ĝin?

Do se vi interesiĝas pri mendo de mia libro, bonvolu mendi ĝin rekte de mi kaj ne de la libroservo.

Mia retadreso estas:

[nicole@cryogenic.net](mailto:nicole@cryogenic.net)

□

## Prelego pri Esperanto en Universitato de Sidnejo de Nicole Else

Vi ĉiuj supozeble jam audis pri la 2 kursoj kiuj okazis ĉi jare en Universitato de Novsudkimrujo: kurso por komencantoj kaj kurso por trejni Esperanto-instruistojn.

Sed ankaŭ alia universitato en Sidnejo, la fama University of Sydney, tute ne ignoras Esperanton. Mi kontaktis ĉefinstruistojn kaj skribis inter alie:

“I’ve just read that you have done some research on the benefits of bilingualism and I was wondering whether you have done some research too about Esperanto. It seems to me that most people don’t know much about that fascinating

language. What do you think?”.

Ne longe poste mi ricevis telefon Alvokon invitantan min veni al la universitato por prelegi pri Esperanto en klaso de estontaj lingvinstruistoj.

Tiu prelego okazis la 3an de novembro. Ĝi daŭris dum tuta horo. Unue mi ja iomete parolis pri la historio de Esperanto kaj legis tion kion Zamenhof diris en Boulogne en 1905 pri la fakto ke tie renkontiĝis ne Francoj kun Britoj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj.

Poste mi parolis pri la celoj de Esperanto, do mi klarigis, ke la

celo de Esperanto ne estas anstataŭi ĉiujn lingvojn per unu nura lingvo. Mi klarigis, ke ŝanĝoj en socio okazas malrapide kaj do estas multe tro frue por diri, ke Esperanto estas malsukceso. Eĉ bonega ideo kia la metra sistemo bezonis pli ol 100 jarojn por esti akceptita.

La 3-a parto temis pri la lingvo mem. Mi provis klarigi, ke la gramatiko ne similas al Eŭropaj lingvoj, sed ke Esperanto havas multajn elementojn kiujn oni aldonas unu al la aliaj, ke estas iom kiel *Lego*-brikoj. Kun limigita nombro de brikoj vi povas krei nelimigitan kvanton de konstruaĵoj. Mi klarigis pri la numeroj en Esperanto kiuj funkcias kiel en la ĉina kaj japana lingvoj. En la angla ne estas evidente por tre juna infano kio estas “twelve” kaj ke ĝi estas 10 + 2. En Esperanto, kiel en la ĉina kaj japana, oni diras, ke mi laŭvorte tradukas “ten two” por 12. Mi klarigis, ke Esperanto estas ofte nomata artefarita lingvo, sed ke ĝi fakte ŝajnas al la parolanto pli natura ol multaj aliaj lingvoj. Mi klarigis, ke tre junaj infanoj kutime ĝeneraligas regulojn kaj do nature diras “one mouse, two mouses”, sed ke en la angla oni ja ne rajtas paroli en tia natura maniero, sed ja en Esperanto. Mi citis “Esperanto is an artificial language like the motor car is an artificial horse”

Poste la studentoj auskultis 5 minutojn el la Mazi-videobendo.

En la 4-a parto mi klarigis kial Esperanto estas pli facila ol aliaj lingvoj. Mi kompreneble menciis,

ke ĝi estas fonetika kaj ke ne ekzistas malregulaj verboj, sed mi pli detale klarigis kial necesas lerni malpli da vortoj dank’ al la prefiksoj kaj sufiksoj. Mi klarigis pri “mal” kaj “ejo” kaj ankaŭ klarigis la vorton “malsanulejo”

Studento diris, ke Esperanto ja eble taugas por eŭropanoj, sed ke azianoj bezonos multe pli longe por lerni Esperanton, do Esperanto estas tre maljusta solvo. Mi atentigis, ke meze oni eble bezonas 200 horojn por studi Esperanton kaj ke aziano bezonos ja pli longe, eble 240 horojn, sed ke li bezonas almenaŭ 2000 horojn por lerni la anglan. Do ĉu oni devas malakcepti Esperanton ĉar ĝi ne estas perfekte justa kaj instigi ĉiujn studi la anglan?

La 5-a parto temis pri kial instrui Esperanton en lernejoj. Mi argumentis, ke lernejoj ofte ne havas sufiĉe da tempo por ebligi studentojn lerni lingvon ĝis flueco. Malrapida progreso tre malinstigas infanojn. Krome mi klarigis, ke kiam temas pri muziko oni kutime komence instruas relative facilan instrumenton, kiel la fluton kaj nur poste malpli facilan kaj do oni povus fari same kun lingvoj. Instrui Esperanton en elementaj lernejoj kaj instrui aliajn lingvojn en altlernejoj. Tio ankaŭ solvus la problemon ke infanoj en altlernejoj ofte venas el diversaj elementaj lernejoj kiuj instruis malsamajn lingvojn kaj ofte okazas, ke en la altlernejo ili ne povas daŭrigi studi la saman lingvon kiun ili studis en elementa lernejo.



Mia 6-a parto estis: Kiel uzi Esperanton nun. Mi insistis, ke ĝi utilas dum vojaĝoj. Ofte personoj diras, ke estas ege malfacile renkonti esperantistojn hazarde surstrate. Sed mi klarigis, ke estas listoj de esperantistoj kaj *Pasporta Servo*, do oni ne bezonas fidi al hazardo por renkonti geeesperantistojn. Mi montris al la studentoj plurajn Esperanto-revuojn: *Monato*, *Juna Amiko*, ktp. Mi diris, ke ekzistas multaj Esperanto-libroj

Sekva parto estis kiel lerni Esperanton: per libro, per interreto, en Universitato de NSW, dum la somerkursaro, ktp.

Bedaŭrinde restis ege malmulte da tempo por paroli pri Esperanto en Aŭstralio. Se mi havintus pli da tempo, mi estintus ankaŭ parolinta pri kial la angla ne taŭgas kiel internacia lingvo. Finfine la studentoj ricevis liston kun interesaj ligiloj en la reto kaj citaĵon de ĉina esperantisto:

“Esperanto is a linguistic handshake. When two people shake hands, they both reach out halfway. When two people speak Esperanto they have both made the effort to learn a relatively easy, neutral language instead of one person making the huge effort to learn the other person’s difficult national language and the other person making no effort at all except to correct his/her interlocutor’s errors”

Jen alia cito, kiu eble povas esti utila, se vi provas skribi klarigi pri Esperanto. Ĝi estas traduko el Es-

peranto de tio, kion diris ĉina laboristino:

“I have always wanted to have contacts in the outside world. So I went to an English course. After an exhausting work day, there is not much energy left to strain one’s mind and overload one’s memory with so many unexplainable things (why, in English, can’t you deduce ‘first’ from ‘one’ as you deduce ‘tenth’ from ‘ten’ and as we do in Chinese? Why can’t you deduce ‘my’, ‘mine’, ‘me’ from ‘I’ as we do in Chinese?). So I realized that I simply could not assimilate all these complications. Just imagine, in English, if you know how to say ‘tooth’, this does not help you to say ‘dentist’, you have to memorize yet another word. And if you want to say ‘mare’, ‘stallion’ or ‘colt’, remembering ‘horse’ is of no avail. In Esperanto, as in Chinese, those words are derived from the basic word according to a consistent pattern. I’m very glad that when a course of Esperanto was organized in our factory, I decided to follow it. Here I felt comfortable, and I enjoyed the lessons very much. Esperanto is like Chinese, a language entirely consisting of invariable elements that combine without limitation. People say that English is the international language. But what’s the use of an international language that cannot be acquired by working people? I have now many contacts all over the world. For what I wanted, I didn’t need English. Too bad that I was so late in discovering it.” □



## • Recenzas Odlo Bokserp

**Mi Hu:** *La unua vojaĝo*. Eld. Anshe Haarec, Adams [Britio] 2017. 348p., broŝ. 15 tutpaĝaj ilustraĵoj, plus desegnaĵoj en la teksto. Prezo: €98.

Takso: 🍷?

Estas malfacile recenzi libron de tiel eminenta esperantisto kaj monda heroo. Supozeble la Reaktoro petis min recenzi ĝin, ĉar mi partoprenis la ekspedicion, kaj tial pli bone ol la plej multaj povas taksi la valoron de la verko. Sed estas ĝenerale sciate, ke inter la aŭtoro ekzistas kelka manko de reciproka simpatio, do eble mia objektiveco pridubeblas.

Tamen, negrave ĉu aŭ ne mi estas la plej kompetenta recenzisto por la libro, mi sentas devon averti la legantojn pri ĉi tio: *La Unua Vojaĝo* estas danĝera libro, kaj gravas averi nin pri ĝi.

Unue, kvankam ne plej grave, estas, ke ĉie en la 348 paĝoj Mi Hu klopodas prezenti la ekspedicion kvazaŭ grandiozan sukceson. Tia ĝi ne estis. Ĝi estis la plej granda fiasko kiun nia civilizacio renkontis ĝis nun, kaj sekvi lian konsilon (sur paĝo 346) povus okazigi tragedion laŭ skalo neniam antaŭe vidita,

Ĉu nia homaro nenion lernis, post la kolonizado de la Amerikoj? Ĉu nia homama sento neniom pli grandigis post la buĉado de indiĝenoj en Aŭstralio? Ĉu estas koncep-

teble, ke en ĉi tiu nia moderna kaj “kristana” mondo, iu serioze proponus ke 15 milionoj da personoj estu senditaj al tiu trankvila, paca, kaj (laŭ nia vidpunkto) “subevoluinta” loko por sklavigi la loĝantojn kaj detruji la kulturojn tie? Ĉu estas koncepteble, ke UN ne nur serioze konsideras la proponon, sed eĉ nomumis komisionon por prepari la praktikajn detalojn de ĝia evelktivigo? Kiel voĉo krianta en la dezerto, mi avertas, mi alvokas, mi petegas: pensu, kion vi faras?!!

Jes, Mi Hu prezentas la aferon laŭ aliaj terminoj. Li ne parolas pri sklavigo, sed pri “amasoj da labor-emuloj, kiujn eĉ pagi oni ne devas.” Li ne parolas pri detruo de kulturo, sed diras ke “estas eĉ nia kristana devo, levi tiujn ulojn el ilia marĉeca ekzisto; instrui ilin laŭ la normoj ĉie akceptitaj. Kaj se, komence, estos necese kvazaŭ trudi nin al tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenas nian celon, tamen ili dankos nin poste.” Vidante tiajn frazojn en libro el 1498, ni ridetus. Kial ni ne povas egale klare vidi la nuntempon?

Mi diras ke la libro de Mi Hu estas danĝera. Ĝi estas danĝera, ne ĉar ĝi mensogas pri faktoj: ĉi tio estas direnda, la libro ĉie skrupule prezentas faktojn; sed ĉar ĝi per sia interpreto de la faktoj tiel trompe prezentas la situacion. Oni diras, ke la *Readers Digest* planas

prezenti la libron en kondensita formo, en sia julia numero. Tial estas grave, ke jam nun oni sciu pritaksi ĝin.

Bone, do: ni kvar (Mi Hu, mi mem, Robert Rosenmill, kaj Jean Affaires) partoprenis la ekspedicion al Marso. El la kvar, Robert mortis. *La Unua Vojaĝo*, sur p. 178, objekte raportas lian morton. Bando da indiĝenoj atakis nin, kaj mortbatis Roberton dum li brave klopodis defendi nian ŝarĝaŭton. Kion tamen ne diras la aŭtoro, kaj tion oni devas scii, estas ke la indiĝenojn kuraĝigis kaj helpis Jean Affaires: jes, tiu sama Jean Affaires kiu estis lasita sur Marso kiel administranto de la tera kolonio, kaj al kiu lastatempe donis la Nobelkomitato sian pacpremion! Tiom la mondo scias pri la vera historio de la ekspedicio.

Robert mortis, ĉar li aŭdacis kontraŭstari la planojn de Mi Hu kaj Affaires. Jam de la unua momento, kiam ni eliris la raketon kaj metis niajn piedojn sur la firman, fekundan grundon de Marso; jam de la momento, kiam Robert trovis ke la atmosfero enhavas sufiĉan oksigenon por facila spirado; jam de la momento kiam Affaires rimarkis la vastajn kampojn da greno kaj la metalriĉajn grundojn; jam de tiuj momentoj, nin obsedis nur unu penso — kia neimageble perfekta loko por tera kolonio, al kiu ni povus transsendi la malsatajn milionojn, pri kiu povus amike

kunlabori la malamikemaj nacioj de la tero.

Jes, nin ĉiujn tiu penso obsedis. Mi Hu prave, kaj bele, priskribas tiun unuan tagon, en sia dua ĉapitro. (La unua ĉapitro estas nur enkonduko.) Kaj ne malplej Robert entuziasmis. Sed post nelonge, indiĝeno aperis. Tio devus averti nin pri nova komplikigo, sed mi konfesas ke el ni, nur Robert konceptis la moralan problemon. Li estis amatora lingvisto, kaj tuj volis studi la indiĝenan lingvon. Ke li, kaj ni, malsukcesis, estas sendube nur pro la diferenco inter la tera kaj marsa kulturoj, kaj certe ne pro manko de klopodado nia.

Mi menciuj, ke la specimenoj de marsa lingvo donitaj en *La Unua Vojaĝo* (apendico a) ne estas senescepte ĝustaj. Mi supozas ke temas pri preseraroj. Mi zorge reaŭskultis la magnetofonbendojn, kaj sur paĝo 347, supre, la unua linio nepre tekstas “ubanorekdo brosele mosimufafalenu”. Mi ne enmetas la super- kaj sub-signojn uzitajn de Mi Hu, pro la presproblemo. Mi Hu diras, ke ni tute ne scias ĝian signifon. Tio estas nur parte vera: la marsano, dirante tion, estis ekzamenanta nian ĉielatlason, kaj mi estas certa, ke li volis iel komenti pri ĝi.

Evidentiĝis, ke la indiĝenoj loĝas sur la tuta globo. Denove, Mi Hu pravas, raportante ke ĉe ili koncepto pri grupo aŭ pri komuna posedo ne ekzistas. Ĉe ili, nur pri-

vata posedo ekzistas, kaj sekve nenio simila al tersenca “tribo” aŭ “komunumo” aŭ “nacio” aŭ eĉ “gento” ekzistas. Mi Hu utiligas tiun fakton, por pravigi sian deziron establi teran regadon tie: “Ĉar ne ekzistas grupoj aŭ triboj, ni neniel konfliktus kontraŭ jam establitaj moroj. Ĉar nur individua posedado okazas, preni kiel komunan posedaĵon por la tero la tutan planedon, kaj la diversajn partojn doni al teraj grupoj, neniel ŝanĝus por la marsanoj la vivkutilojn.” Sed kion li ne mencias, estas ke neniu komunumo ekzistas sole el individuoj private posedantaj. Komunumo signifas ke individuoj fordonas iujn rajtojn al la grupo, kaj tio nepre ŝanĝus la kulturon.

Vidu kiel logike Mi Hu prezentas sian argumenton: la marsanoj ne havas reĝon, do establi administranton ne ĝenus ilin. Li eĉ ekaplikis tion, lasante Jean Affaireson tie. La luksa vivo, kiun sendube nun havas Jean Affaires sur Marso, estas facile imagebla. Li povas altrudi impostojn, kaj ilin uzi por si mem ... ĉar ĉio estas nova por ili.

Tion, do, proponas Mi Hu: sendi, amase, 15 000 000 teranojn al Marso. Tie ili loĝos, ĉiu havos laŭvole grandan nomron da sklavoĵoj (“nepagendajn laboristojn” laŭ Mi Hu.) Ĉu aŭ ne la indiĝenoj konscios, ke ili estas sklavoĵoj, — tio ne estas la ĉefa afero. Probable ili *ne* konscios, unue. Ili ja ne konas mo-

non, aŭ pagon, dungadon, aŭ servadon al komunumo. Sed ni konscias.

Ĉar postuli ke 15 000 000 alt-evoluintaj teranoj lernu la “sendube primitivan kaj konceptomankan” lingvon de la marsanoj estus “absurde; neniu mense sana persono proponus tion”, ni devigus ke la marsanoj senescepte lernu nian lingvon. Ilia vasta literaturo (kiu ja ekzistas, malgraŭ la asertoj de Mi Hu) estus poreterne perdita, kiel la indiĝenamerikaj. Ĉar ilia sistemo de paca kunvivado, plena respekto al la rajtoj de alia persono, kaj profundkarakterata evolado (dum la tri semajnoj sur Marso, mi neniam vidis eĉ unu plorantan infanon!) ne konformas al niaj ideoj pri la “la komunumo servas ĉiujn, kaj ĉiu servas la komunumon” ni devas do “civilizigi la indiĝenojn, sed ne tro abrupte. Unue, dum kelkaj jardekoj, ili kultimigu al nia kulturo. Eble post du aŭ tri generacioj, ilia natura progresmanko estos sufiĉe malaperinta, por ke ni povu transdoni al ili malgrandan kvanton da aŭtonomeco. Sed ne estas eble, nun, antaŭvidi la tempon, kiam ne necesos ke terano estu la ĉefa administranto”.

Mi Hu deklaras (p.134) ke ekzistas granda, fervora grupo da indiĝenoj, kiuj entuziasme akceptis nin, kaj laŭeble helpis nin. Jes, tio estas vera. Sed lia raportado kvazaŭ enombrigas la fakton, ke tiuj 6 aŭ 7 personoj estis nur tre

malgranda parto de la tuto. Ĉiam kaj ĉie oni povas trovi kelkajn korupteblajn homojn.



Mi ne povas fini la recenzon, sen mencio kaj akra protesto kontraŭ ĉapitro 4, en kiu M<sub>I</sub> Hu pritraktas min. Estas evidente, ĉar kvankam mi estis unu el la originalaj kvar en la ekspedicio, mian nomon ĝis ĉapitro 4 li mencias nur trifoje, ke M<sub>I</sub> Hu sentas honton kaj lian konsciencon ĝenas liaj glorcetaj planoj. Li sekve devis fabriki mensogojn, por ĉapitro 4, kiuj ĝiskore ofendus min, se ili ne estus senvalorigataj de la teruro kiun prezentas la tuta libro.

Nome, en ĉapitro 4, M<sub>I</sub> Hu diras ke mi kontraŭis lin kaj liajn planojn, ne pro veraj sentoj pri humaneco kaj moralo, sed pro propra monavido. Li diras ke mi akiris “plurmil kvadratajn kilometrojn da metalriĉa tereno”, kaj ke mi timas, ke se UN proprigus por la tero la tutan planedon, mi sekve perdus la eblon fariĝi riĉa ekspluatante la terenon. Kiel en ĉiu versimila mensogo, troviĝas grajneto da vero en lia diro. Estas vere ke mi posedas malgrandan terenspacon sur la planedo. Ĉu metalriĉan, mi ne scias: ĝin donis al mi indiĝena amiko, ĉar mi kuracis lian malsanan filon. Sendube estas vere, ke se UN proprigus por la tero la tutan planedon, mi perdus tiun terenon. Sed supozigi, ke tio motivigas miajn protestojn, kaj ne pura hu-

manismo, estas korvunda falsajo.

Dirinte ĉion ĉi, mi devus mencii ankaŭ la bonajn aspektojn de la libro. Ĝi estas la unua publikaĵo en kiu aperas la belaj kolorfotoj faritaj de M<sub>I</sub> Hu, kaj la informplenaj desegnaĵoj de Affaires. Kiu vere volas vidi, kiel aspektas la marsa surfaco, kia homo estas indiĝeno, k.c., nepre rigardu tiujn bildojn. Ili valoras la (tre malaltan) prezon de la libro. Ĉapitro 3, en kiu M<sub>I</sub> Hu pritraktas la monolitajn monumentojn, kaj la bestaron de la planedo — i.a. la ege amindan kat-similan beston kiun ni nomis laŭ la indiĝena nomo Krrrrro, evidente onomatopea nomo — estas valora kontribuo al nia scienca scio.

Sed, malgraŭ tiuj bonaj kvalitoj, la libro estas — kiel dirite — danĝera. Pli bone estus, atendi la publikiĝon de mia libro *Marso: Nova Espero aŭ Nova Tragedio?* en junio, en kiu la *originalaj* fotoj faritaj de Robert Rosenmill aperos.

***Nota de la redaktoro:*** *la redakcio ankoraŭ ne vidis ĉi tiun libron, kaj do ne povas taksii la pravecon de la supra tre negative recenzo. Sed ĉar ni lasas al niaj recenzistoj plenan liberecon de opiniesprimo, ni ĝin aperigas. Se Sinjoro M<sub>I</sub> Hu deziras respondi al la recenzo, ni volonte disponigos al li spacon en nia sekva numero. —*  

## ELĈIELA VIZITANTO

de Debra McCarney



Je sabato 18an de novembro mi ricevis retmesaĝon de brazila esperantisto — “Mi alvenos morgaŭ en Perto. Mi restos nur unu tagon. Ĉu estas esperantistoj kiujn mi povos renkonti?”. Kia surprizo! Kiom malmulte da tempo por organizi ion ajn! Sed, aliflanke, kia ebleco por okcident-aŭstralianoj kiuj ne ofte bonvenigas eksterlandajn vizitantojn al nia ŝtato!

Mi respondis tuj ke mi ricevis la mesaĝon kaj mi kompreneble klopodos aranĝi ion. Bonŝance li restis surlinie kaj minutojn poste klarigis ke lia nomo estas Julio Calegari, li estas 29-jaraĝa brazilano, sed nuna loĝanto de Dubai. Li laboras kiel stevardisto por la fluglinio “Emirates”, kaj li nur tiun tagon konstatis ke li laboros en aviadilo kiu flugos al Perto.

Mi aranĝis renkonti lin ĉe lia

hotelo post mia labortago kaj mi invitis aliajn vespermanĝi ĉe mia domo por konatiĝi kun li. Kia simpatia viro li estas! Saani, Owen, John, Luigi kaj mi ĝuis ege interesan konversacion dum ni vespermanĝis kune. Julio parolas la portugalan, la hispanan, la italan, la francan, la anglan kaj esperanton kun egala facileco. Ĉar li nun loĝas en Dubai, li interesiĝas pri la araba lingvo kaj intencas lerni ĝin. Lia edzino, kiu ankoraŭ loĝas en Brazilo sed baldaŭ ankaŭ transloĝiĝos al Dubai, estas pola, do li ankaŭ lernas la polan. Ĉiuj demandis lin pri lia vivo en Dubai kaj la klarigoj kaj rakontoj pri tio estis fascinaj.

Li esperas viziti Perton denove kaj ni certe tutkore bonvenigos lin refoje. □

## Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la novembro-decembra numero: 15a de oktobro 2006

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio  
[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)



## La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio  
<http://www.esperanto.org.au/>

*Prezidanto:* (elektota) | [prezidanto@esperanto.org.au](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

*Sekretario:* (elektota) | [sekretario@esperanto.org.au](mailto:sekretario@esperanto.org.au)

*Kasisto:* (elektota) | [kasisto@esperanto.org.au](mailto:kasisto@esperanto.org.au)

*Membreco:* \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$10.

*Pagu al Libroservo de AEA* | [libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au)



## La Novzelanda Esperanto-Asocio

P.O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando  
<http://www.esperanto.org.nz/>

*Prezidanto:* Bradley McDonald | [bradley.m@extra.co.nz](mailto:bradley.m@extra.co.nz)

*Kasisto:* Jackie Fox

*Sekretario:* Howard Gravatt | [hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

**Membreco:** \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo  
(<20-jara: Klubo: \$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €24,00. Pagu ĉe UEA al la konto ael-w de la Libroservo de Aŭstalia Esperanto-Asocio  
Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.  
Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

PRINT POST  
PP631048/0005

POSTAGE  
PAID  
AUSTRALIA